

Theodor Körner,
Am-ebrio

tradukita de Manfred Retzlaff

Al vi, knabino, vibretante
Albatas nur la kor' en mi,
En am', fidele vin celante,
Mi strebas nur al vi.

Nur via nom' kun sankta sono
Ja pleniginta estas min;
En bril' de belo kaj de bono
Mi ĉiam vidas vin.

La am' el ĝermo delikata
Elkreskis kaj ne velkas ĝi,
En miaj sonĝoj, amegata
Knabino, vivas vi.

La kordojn batas mi, fluadas
Entuziasmo super min;
La kantoj, kiujn mi kantadas,
Tutsole nomas vin.

Mi sentas, se vi min rigardas
En paradizo kvazaŭ min.
Ĉielo mia tiam ardas
Ĉe via dolĉa sin'.²

...

²aŭ:

Je vi amplene mi rigardas,
En paradiz' mi sentas min,

Theodor Körner,
Liebesrausch

Dir, Mädchen, schlägt mit leisem Beben
Mein Herz voll Treu' und Liebe zu.
In dir, in dir versinkt mein Streben;
Mein schönstes Ziel bist du.

Dein Name nur in heil'gen Tönen
Hat meine kühne Brust gefüllt;
Im Glanz des Guten und des Schönen
Strahlt mir dein hohes Bild.

Die Liebe sproßt aus zarten Keimen,
Und ihre Blüten welken nie.
Du, Mädchen, lebst in meinen Träumen
Mit süßer Harmonie.

Begeistrung rauscht auf mich hernieder;
Kühn greif' ich in die Saiten ein,
Und alle meine schönsten Lieder,
Sie nennen dich allein.

Mein Himmel glüht in deinen Blicken,
An deiner Brust mein Paradies.
Ach! alle Reize, die dich schmücken,
Sie sind so hold, so süß.

...

Por ĝojo kaj pro am-doloro
 Sopiro sola nur en mi,
 Nur unu pens' en mia koro:
 Aĥ, estu mi ĉe vi!

Es wogt die Brust in Freud' und Schmerzen;
 Nur eine Sehnsucht lebt in mir,
 Nur ein Gedanke hier im Herzen:
 Der ew'ge Drang nach dir.
 Sie nennen dich allein.

*Traduko de la Germana poemo " Liebesrausch" de Theodor Körner
 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-06-
 20.*

MR-155-1 / Arg-764-1535 (2013-01-06 22:56:18)

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Theodor Körner.

Arg-764-1534 (2013-01-07 09:58:55)

La poemo troviĝas en http://gedichte.xbib.de/K%F6rner_gedicht_Knospen+-+Liebesrausch.htm. Pri la poeto vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Theodor_K%C3%B6rner_%28Schriftsteller%29 respektive http://eo.wikipedia.org/wiki/Theodor_K%C3%B6rner.

Ĉielo mia rave ardas
 Ĉe via dolĉa sin'.